LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY FRANCE

# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, filio de I.K.U.E. ★

=== ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPERANTO ===

Prezidanto : S-ro R.Cl. COLAS,- 6, rue de Mèzières - 75006 PARIS.
Sekretario : S-ro Jean BARRIER,- 89, rue Salengro,- 93700 DRANCY.
Kasistino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux,- 27700 LES ANDELYS.

C.C.P.- Association Catholi. Franç. pour l'Espéranto- ROUEN-23 24 93 K-
=== le N° : 1 Fr; === Abono : 4 Fr-; kotizo : 1 Fr; Summa = 5 Fr-.

Redaktoriino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux,- 27700 LES ANDELYS.

Sendu la materialon por la bulteno antaù la 20-a de marto, la 20-a de junio, la 20-a de septembro, la 20-a de decembro.

--- N° 95 --- BULLETIN TRIMESTRIEL --- TRIMONATA BULTENO ----

Sankta Pio X-a, preĝu por ni .

---- Januaro 1973 ---

## E N H A V O

Paĝoj /

2 : Bileto de la prezidanto
3 : La malbono farite al Dio, Meditado
3 & 4 : La Rozario
4 & 5 : Protokolo de la komitatkunveno
6 : Memorindaj datoj
7 : Letero de D-ro Albault al nia prezidanto
5 : La legantoj skribas
2 : Nekrologo

paĝoj :

8 : Nia kongreso en Paris 1973
9 : Aliĝilo
10 : lingva angulo
10 : nia membraro
8 : Fonduso-Domo UFE (2-a listo)
11 : Distra paĝo
11 : Kotiztabelo

La venonta komitatkunveno okazos ĉe Chabrol la 25-02-73 je la 15-a. Iu ajn membro povas ĉeesti kiel observanto.

§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§

# B I L E T O   D E   L A   P R E Z I D A N T O.

A tous nos lecteurs, à tous les membres et amis de notre Association, l'Estraro de F.K.E.A. adresse ses voeux pour l'année 1973.

Nous souhaitons à tous la réussite dans leurs activités personnelles, et aussi un peu de temps et de force à consacrer à notre Mouvement.

Un immense effort se développe, parmi les Eglises Chrètiennes, pour dominer les différents historiques qui attristent nos rapports. Les motifs qui les opposaient autrefois se sont beaucoup atténués. Une recherche loyale, tant au niveau des clercs que des fidèles, progresse vers cette unité, qui a pour fondement l'Evangile, et nous rassemble dans le Christ, tous fils d'un même Père.

Une des cause profonde de ces divergences a été l'incompréhension faisant obstacle à une saine et claire expression des mystères de la foi: Incompréhension du langage, différence d'acquis culturel.

Aussi, l'approche encore lointaine de l'Unité des chrétiens demande tout d'abord qu'ils soient en mesure d'échanger leurs pensées, de se rapprocher par le moyen du langage. Il ne suffit pas de tout attendre des théologiens. Il faut que le peuple de Dieu soit un. Il est du devoir de chacun d'y travailler

Pour nous, dans le monde Espérantiste auquel nous adhérons, n'avons-nous pas ainsi un moyen privilégié de progresser dans cette voie ?

Certes, rien ne se fera du jour au lendemain. Mais l'effort conjugué de tous les chrétiens partageant le même idéal, et utilisant l'Espéranto servira au rapprochement, à la recherche pratique de tout ce qui nous est commun, de tout ce qui peut être mis en commun. Ainsi nous apporterons une contribution positive à l'oeuvre de l'unité.

René-Claude COLAS.

---

# N E K R O L O G O

Nia tiel simpatia sacredoto, Raymond Lavergne el Maurecourt (Yvelines), kiu celebris nian kongresan diservon en St-Germain-en-Laye, forpasis la 22-an de Junio 1972. Ni preĝu por la ripozo de lia animo.

# L A M A L B O N O F A R I T A A L D I O .

( 2 Sam. 12, 13-17 )

"Tiam David diris al Natan : Mi pekis antaù la Eternulo. Kaj Natan diris al David : La Eternulo forigis vian pekon, vi ne mortos; sed ĉar vi per tiu faro incitis la malamikojn de la Eternulo, tial la filo, kiu naskiĝis al vi, mortos. Kaj Natan iris en siandomon.

Kaj la Eternulo frapis la infanon, kiun la edzino de Urija naskis al David, kaj ĝi dangere malsaniĝis. Kaj David ekpreĝis al la Eternulo pri la infano; kaj David fastis, kaj li eniris, kaj pasigis la nokton sur la tero. Kaj ekinsistis super li la plejaĝuloj de lia domo, por igi lin leviĝi de la tero; sed li ne volis, kaj li ne manĝis kun ili."

MEDITADO : Kiel longe oni ne komprenas, ke Dio estas Amo, ke Li povas suferi la malbonfarojn al la aliaj, tiel ankaù oni ne povas diri : "Mi pekis kontraù Javeo" aù "Mia Dio, mi treege bedaùras, ĉar mi ofendis Vin". Kiam mi prenas la porcion de la mizerulo - eĉ ne sciante tion - Dio suferas : Lia Filo mortas sur la kruco. Sed, ĉar Lia morto estas pardono, kiamaniere mi povas kompensi ?

---

## L A R O Z A R I O

La Meso estas la savo - La Rozario estas la batalo.

Kiu batalo ? Tiu, kiun de ĉiu tempo la homo kondukas kontraù sin mem; sed ankaù, sed precipe, en ĉi tiu tempo tre aparta, kiun ni vivas, tiu kiun Maria devas fari kontraù la Princo de ĉi tiu mondo.

"Ĉi tiun preĝon la Dua Vatikana Ekumena Koncilo rekomendis al ĉiuj infanoj de la Eklezio, laù-maniero tre certa kvankam ne eksplicita, dirante : " ke oni estimas tiujn agmanierojn kaj devociekzercadojn al Maria, kaj ke la instruaùtoritato rekomendis ilin dum ĉiuj jarcentoj." Paùlo VI.

Kaj la Papo, kies animo estas angora en la antaùsento " de la horaj ruiniĝoj, kiujn neniu povas imagi en ĉi tiu momento", petegas nin " kun granda ekkrio kaj larmoj", ke oni uzadu tiun preĝon "taùgan por moderigi la malbonon kaj ekzorci la ruiniĝojn".

Satano regas : estas forlega evidentaĵo, Satano devas esti venkita estas definitiva promeso de Dio. Kiu devas venki lin ? Maria, kaj neniu alia el Maria . Car la dia justeco volis, ke kiu venkis per la virino, Eva, estu venkita per la virino, Maria. .../...

.../...

Kiel tiam ne konjekti, ke Satano strebos kontraŭ Marian, kaj kiel hodiaŭ ne vidi, ke estas ĉi, kiun li serĉas malarmi ? Nu, Maria povas esti atingita nur interne ? Ne gravas, Diablo farigos sin bona apostolo : sagaca teologo, fida advokato li scios inspiri sanktajn argumentojn, kiuj malgrandigos Marian nur por malpliigi ŝian timindan potencon. Sed ne sufiĉas ! Li ne nur bone konas la antaŭdestinitinon al la Batalo, sed li ankaŭ scias per kiu armilo ŝi devas lin venki. Kaj tiu armilo, volita de Dio, estas la Rozario. Ha ! Kiom estas facile al la malamiko, kun la komplezo de niaj fidaj intelektuloj, insultmoki tiun preĝon parolon, meĥanikan monotonan kaj malplenan, nur taŭgan por la maljunaj virinoj !

Ĉiuj sanktuloj estis fidelaj al la Rozario; ĉiuj papoj admonis nin trapreĝi ĝin, kaj neniam tiom multe, ol ekde kiam ni eniris en la Malbonaj Tempoj; sed la doktoraĉoj primokas tiujn glorajn ekzemplojn kaj tiujn definitivajn admonojn.

(daŭrigota)

Raoul AUCLAIR, tradukita de M. COLLEU

==========================================================

## K O N S I L I A   K U N V E N O

de la 26-a de Novembro 1972

---

Ĝi okazis en Parizo, strato de Chabrol, en ĉeesto de S-ino Vincent S-to Baudry, S-roj Colas, R. Despiney, Ligot kaj F-to Marmou - Petis senkulpigon : S-roj Barrier, Bessière, Ribot kaj Véron.-

Ankaŭ ĉeestis kiel observanto S-ro Maurice Valluet el Orléana.

---

La prezidanto malfermas la konvenon je la 15-a per preĝo.
1° - La protokolo de la lasta kunveno estas unuanime aprobita.

<u>II- Financaj aferoj -</u>

1 - Fonduso-Domo U.F.E. - Venis ankoraŭ 150 Fr kiel novaj donacoj. D-ro Albault kaj S-ro Pierre Royer sendis leterojn por danki kaj gratuli nian asocion pro ĝiaj donacoj.

2 - Budĝet-propono por 1973 - Oni decidas antaŭstarigi diversajn regulajn rubrikojn.

Informado : por ĝi estos 10 % el nia financa rezervo elprenitaj.

.../...

.../...

Mesintencoj : (propono de S-ro Despiney)

Repago de la vojaĝo al la konsiliancoj :(propono de S-ino Vincent)

III- Administraj aferoj -

1 - F.K.E. : rubriko "la legantoj skribas"

ĉar la legantoj ne plu skribas, oni denove invitos ilin partopreni tiun rubrikon.

S-ro Dauchez proponas ke oni eldonu eltiraĵojn el korespondaĵoj.

S-ro Ligot proponas ludpaĝon.

2 - Renovigo de 1/3 de la Konsilio.

S-roj Barrier, Ligot, Ribot kaj F-to Marmou rekandidatiĝas.

F-ino Vanneau sin proponas kiel nova kandidatino.

IV- Kongresaj aferoj -

S-ino Vincent legas la detalojn de la regularo de la "Maison de retraite du Sacré-Coeur" kie okazos la kongreso de nia asocio en 1973.

Oni pristudas la programon de la du tagoj de la kongreso.

Oni fiksas la prezon por la aliĝoj. S-ro Despiney konsentas kolekti ilin.

S-ro Despiney proponas skribi al S-to Louis Wei Tsing Sing por inviti lin al kuncelebrado de la Meso en Esperanto.

V - Diversaĵoj -

S-ino Vincent legas leterojn de S-roj Fresneau kaj Ribot pri Gregora Kanto.

La venonta kunveno de la Konsilio okazos la 25-an de februaro 73

Post la recitado de "Patro Nia", la prezidanto fermas la kunvenon je la 17-a.

Protokolis R. Despiney.

==================================================================

LA L E G A N T O J S K R I B A S .

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

S-ro X. Dauchez (Essonne) proponas starigi novan rubrikon titolitan "El mia korespondado" en kiu aperus eltranĉaĵoj el leteroj ricevitaj de niaj legantoj. Li skribas : "Informoj rekte senditaj de plumamiko al alia povas interesi aliajn."

Daŭre skribu al nia redakcio, kritiku, sugestu, proponu.

mmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmm

# M E M O R I N D A J   D A T O J .

La 19-an de majo 1964, Papo Paùlo la VI-a akceptis en privata aùdienco sacerdoton Beckers, prezidanton de IKUE, kaj kelkajn estra-ranojn de IKUE.

En la unua kongreso IKUE/KELI, okazis sabaton la 27-an de Julio 1965, en la katedralo Sankta Georgo en Limburg, Germanujo, kantata esperanta diservo kaj esperanta koncerto.

Laù mia scio, la unuan fojon okazis publika kaj oficiala koncerto kun religiaj verkoj en kristana preĝejo, en la Internacia Lingvo Esperanto.

La 9-an de septembro 1965, okazis la inaùguro de la panelo "Patro Nia" en la preĝejo PATER sur la Olivarba Monto, kaj de la panelo "Magnificat" esperantlingve en Ain Karem, en la preĝejo de la Vizitado.

La preĝejo "Patro"havas klaùstron kun ceramikaj paneloj, kiuj ripetas la preĝon en 52 lingvoj. Nun la Esperanto-panelo estas la 53-a

La panelo "Magnificat" estas la 32-a sur la muro ĉirkaùanta la preĝejon; kiu memorigas pri la vizito de Maria al Elizabeta.

Okaze de tiuj inaùguroj, la Sankta Meso estis celebrata en Esperanto, laù speciala aprobo de la Vaticana Ofico.(17-8-1965)

La 1-an de aùgusto 1965, okaze de la IKUE-kongreso en Valencio estis celebrata, la unuan fojon en Universala Kongreso, la Sankta Meso en Esperanto; ĉeestis, krom la eùropaj kaj usonaj esperantistoj, ankaù japanj : entute ĉirkaù 180 ĉeestantoj.

La Sankta Patro konsentis, la 21-an de aprilo 1966, ke IKUE, okaze de kunvenoj kaj kongresoj, uzu Esperanton en la legaĵoj kaj preĝado de la fidelujoj dum la diservo, kiel en la 205 aliaj liturgiaj lingvoj.

La 31-an de julio 1966 en la franciskana preĝejo en Budapest partoprenis 1500 esperantistoj el 25 landoj la celebradon de la Sankta Meso okaze de la Universala Kongreso. Orĥestro ludis kaj ĥoro kantis la Meson de la Kronado de Mozart.

Kompilis, S-ro Joseph KRAEMER.

""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""

## LETERO DE D-ro ALBAULT AL NIA PREZIDANTO :

La prezidanto :
D-ro A. ALBAULT
32 av. Et. Billières
31300 TOULOUSE

S-ro R.- Cl. COLAS
Prezidanto de la
Franca Katolika Asocio por Esperanto
6 rue de Mézières
75006 PARIS

Tre estimata Sinjoro Prezidanto,

S-ro Royer ĵus avertis min pri la kontribuo de via Asocio al la kreskigo de nia fonduso "Domo".

Permesu, ke mi elkore danku vin pro tiu valora kontribuo. Mi vere ĝojas ke via asocio decidis alporti sian ŝtonon al la konstruo de ĉiuj kaj mi petas vin varme danki viajn membrojn, dank' al kiuj via decido povis fariĝi efektiva.

Mi tre esperas, ke ni povos baldaŭ realigi nian fonduson "Domo", t.e. aĉeti novan lokalon, kaj mi antaŭĝojas ĉe la penso, ke ĉe la inaugura ceremonio, kiun ni certe okazigos, mi povos premi ankaŭ vian manon kaj eble ankaŭ tiun de viaj plej proksimaj kunlaborantoj. Intertempe vi estas bonvenaj en nia sidejo por viaj dimanĉaj kunsidoj kaj mi esperas, ke ankoraŭ tre longe estos oportune al vi daŭre kunveni en nia lokalo. Ni ja devas interhelpi unu la alian, fronte al la maro de indiferenteco kiu nin ĉirkaŭas; sed ĉiuj kunigitaj ni certe sukcesos!

Dankante vin kaj vian asocion nome de la Franca Unuiĝo,
mi restas sincere

Via

D-ro A. ALBAULT.

§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§

KONGRESO DE LA FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO.

PARIS 12/13-an de Majo 1973

**********

KONGRESEJO : Maison de Retraite du Sacré-Coeur, 3, cité du Sacré-Coeur
40, rue du Chevalier de la Barre - 75018 PARIS
(Metro-stacio : Abbesses )

KORESPONADRESO KAJ ALIĜOJ : S-ro R. Despiney,- 43 quai de Champagne
94170 LE PERREUX SUR MARNE
p.ĉ k. PARIS - 14 703 97 - R. Despiney -

ALIĜKOTIZOJ : individuo 6 Fr
geedza paro 8 Fr
infano ĝis 16-jara, blindulo, alilandano : senpage

LIMDATO DE ALIĜO : 30-an de aprilo 1973

°O°

PROVIZORA PROGRAMO

Sabaton, ekde 14.00 : akcepto en la kongresejo
16.00 : vizito de la baziliko kaj de la monteto Montmartre (preĝejo S-ta Petro, muzeo, ĝardenoj)
19.00 : komuna vespermanĝo
20.00 : preparo de la morgaŭa diservo, distrajoj.
Dimanĉon, je la 9.00 : ĝenerala kunveno
12.00 : komuna tagmanĝo
15.00 : diservo

-:-:-:-

RESTADPREZOJ : nokto : 6,50 Fr; matenmanĝo : 4,50
sabata vespermanĝo : 10 Fr + trinkaĵo
dimanĉa tagmanĝo : 10,50 Fr + trinkaĵo
Bonvolu kunporti buŝ- kaj tualet-tukojn.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

fonduso - domo U.F.E. (2-a listo)

10) F-ino Le Boëdec : 50 Fr; 11) S-ro Broise : 50 Fr; 12) S-ro Thiollière (3) : 50 Fr; 13) Anonimulo : 100 Fr; 14) S-ro Colas : 73 Fr. Fina sumo 818 Fr.

Koran dankon al ĉiuj donacintoj.

££££££££££££££££££££££££££$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$££££££££££££££££££

# A L I Ĝ I L O .

NOMO KAJ ANTAŬNOMO : ...

NASKIĜDATO : ....

ADRESO :

Mi aliĝas al la kongreso de FKEA kaj samtempe pagas kiel kotizon al S-ro R. Despiney p.ĉ.k. Paris 14 703 97 la sumon de .... Fr-

Mi uzos la jenajn servojn :

| | | |
|---|---|---|
| sabatan vespermanĝon | JES | NE |
| tranoktadon sabaton vespere | JES | NE |
| " dimanĉon vespere | JES | NE |
| matenmanĝon dimanĉon | JES | NE |
| LUNDON | JES | NE |
| dimanĉan tagmanĝon | JES | NE |

Mi proponas la jenajn servojn :

| | | |
|---|---|---|
| legadon dum la diservon | JES | NE |
| kantadon | JES | NE |
| monokolekton | JES | NE |

Mi alvenos la .. -an de majo je la ..... horo per aŭtomobilo, vagonaro.

Mi forveturos la .. -an de majo je la ..... horo.

Dato kaj subskribo :

Bonvolu plenigi unu aliĝilon por ĉiu persono de via familio. Uzu samformatan paperon.

Nepre aliĝu antaŭ <u>la 30-a de aprilo 1973.</u>

# LINGVA ANGULO

Pro bedaùrinda ellaso de unu paperfolio, la redektorino forgesis aperigi la proponitajn tradukotajn esprimojn kaj petas pardonon de la kutimaj kunlaborantoj. Hodiaù, komprenebble, la listo estas pli longa. Jen la proponoj de S-ino Michau kaj S-ro Jahier :

1) être bien dans sa peau; 2) être mal en point; 3) vous n'y êtes pas du tout; 4) gagner sur tous les tableaux; 5) prendre un pot; 6) avoir le pied marin; 7) être d'une humeur de chien; 8) faire son beurre sur le dos de quelqu'un; 9) se mettre en boule; 10) un flic.

* * *

Jen kelkaj rimarkoj de S-ro Bessière :

Aujourd'hui je voudrais attirer l'attention sur la traduction des deux verbes siffler et vivre.

Siffler se dit en français des personnes, des choses et des animaux. L'Espéranto, langue riche, le traduit selon le cas, soit par "fajfi" s'il s'agit d'une personne (Ex : Petro fajfis belan arion), soit par "sibli", s'il s'agit d'un animal (La serpento siblas) ou des choses (la vento siblis dum la tuta nokto).

Vivre est soit transitif, soit intransitif.

S'il est intransitff, sa traduction est "vivi" (Mia patrino estas tre malsana, sed ŝi ankoraù vivas). S'il est transitif, il faut le traduire par "travivi" ( Talleyrand travivis la tutan Revolucian periodon ne perdinte la vivon).

mmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmm

## NIA MEMBRARO.

Dumvivaj membroj : 27) S-ro Royer (Hauts de Seine)


Novaj membroj 1973 : 1) S-ro Bourgeois (Pas de Calais),
2) S-ro Dubuisson (Bouches du Rhône)

Membroj subtenantoj 1973 : 1) S-ro Bessière (I & V); 2) F-ino Esprit (Hte-M); 3 ) F-ino Stas (S & L); 4) S-ro Béliard (L-A)

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

# D I S T R A   P A Ĝ O .

Problemo N° 1 de S-ro Ligot (Val d'Oise)



R = nur radiko
ekz.=: radik'

HORIZONTALE : 1) Konforma al etiko; tola ujo.- 2) adeptiĝi; glaso fiera (R) 3) Madonon. 4) do, ne vivnaske; ripetita vokalo; grasa suko de iuj semoj. 5) juĝficisto; instrumenta. 6) Fuŝa kalkulero; ne aliloke. 7) Pasia emo; greka litero. 8) pereli iamaniere, salajro.

VERTIKALE : 1) Dipatrino. 2) Grasa frukto; sufikso. 3)Inklino al rediro. 4) Jarhava; amason. 5) Adjektivo taŭga por krucvortoj. 6) Vojaĝi returnen. 7) Nombro; ripetita vokalo. 8) Akustika studaĵo; iama sumo. 9) Altarservistoj. 10) Strii per sulketoj. 11) Kunjunkcio; le kvin vokaloj, senorde.

Solvo en la venonta numero !...

================================================================

## K O T I Z T A B E L O   1 9 7 3

FrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFr

| | |
|---|---|
| IKUE kun "Espero Katolika ............................ | 17 Fr |
| IKI kun " Vojo, Vero, Vivo ............................ | 5 Fr |

Peranto : G. Véron, C.C.P. - Rouen - 11 88 63 Z-

---

| | |
|---|---|
| ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" .............. | 5 Fr |
| Infano malpli ol 16- jara .......................... | 2 Fr |
| Membro bonfaranto ................................... | 25 Fr |
| Dumviva membro ...................................... | 100 Fr |
| UFE kun "Revue Française" ........................... | 38 Fr |
| UEA kun "Esperanto" kaj "Jarlibro" .................. | 50 Fr |

C.C.P.-Association Cath. Franç. pour l'Espéranto,-Rouen-23 24 93 K.- p.ĉ.k.=

========FrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFr$$$$$$$$$$$$$$$$££££££££££££££££FrFrFrFrFrFrFrFr====

Dépôt légal : 1° trimestre 1973
Papier de Presse N° 34.745-
Directeur-Gérant : Gaston VERON

/// Polycopié par : F.M.C.
/// Prieuré Saint-Martin
/// LA HOUSSAYE EN BRIE
/// 77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE.

================================================================